Informilo de Oktobro 2012

Numero 2, Oktobro 2011

Universala Esperanto-Asocio Organizis Seminarion pri Unuiĝintaj Nacioj Kaj UNESKO

La 97-a Universala Kongreso de Esperanto, organizita de Universala Esperanto-Asocio en Hanojo, Vjetnamio de 28 julio ĝis 4 aŭgusto 2012, inkluzivis seminarion pri la laboro de Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko. La seminario, gvidata de Humphrey Tonkin kaj Neil Blonstein, reprezentantoj de UEA ĉe UN en Novjorko, kaj Renée Triolle, reprezentanto de UEA ĉe Unesko, donis superrigardon de la strukturo de la du organizaĵoj kaj precipe iliaj humanecaj kaj homrajtaj agadoj. La celo de la seminario estis disvastigi informojn pri UN en la Esperanto-parolanta komunumo. Kvardeko da homoj partoprenis, el granda gamo de landoj kaj de profesioj, inkluzive de instruistoj. Materialo el la seminario estas troveblaj ĉe la retpaĝaro de Esperanto por UN, ĉe www.esperanto-un.org, kie ankaŭ haveblas tradukoj de gravaj UN-dokumentoj, glosaro de UN-terminoj en Esperanto, kaj priskribo de la strukturo de UN.

Propono Krei Laborgrupon pri Lingvo kaj Unuiĝintaj Nacioj

Kiel postsekvo de sia Simpozio pri Lingvo kaj Unuiĝintaj Nacioj, kiu kunvenigis preskaŭ centon da UN-funkciuloj, reprezentantoj de neregistaraj organizaĵoj, universitatanoj, kaj anoj de la publiko la 1-an de majo ĉi-jare, la Asocio faras paŝojn por starigi Laborgrupon pri Lingvo kaj Unuiĝintaj Nacioj por ekzameni la formojn, en kiuj oni praktikas multlingvismon ĉe UN, la manierojn laŭ kiuj oni aplikas lingvajn politikojn, kaj kiel dumtempaj aranĝoj estas faratah por trakti lingvajn diferencojn en krizaj situacioj. “Ni deziras aŭdi de universitatanoj kaj fakuloj, kiuj interesiĝas pri tiu ĉi tereno,” komentis profesoro Humphrey Tonkin, reprezentantoj de la Asocio ĉe UN; “ili kontaktu nin por ricevi pli da informoj.”

La Ĝenerala Sekretario Mesaĝis Okaze de la Internacia Tago de Paco

Okaze de la Internacia Tago de Paco, 21 septembro 2012, la Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, Ban Ki-moon, vokis al “kompleta ĉesigo” de militaj malamikecoj tutmonde, kaj proponis minuton de silento por honori la viktimojn de militoj – “tiujn, kiuj perdis sian vivon, kaj tiujn, kiuj pluvivis sed devas nun elteni traŭmon kaj doloron.” Atentigante pri la temo de la ĉi-jara observo, “Daŭripova Paco por Daŭripova Estonteco,” sinjoro Ban klarigis, ke “armitaj konfliktoj atakas la esencajn kolonojn de daŭripova evoluo.” Lia mesaĝo enhavis tri specifajn rekomendojn: “Naturajn rimedojn oni uzu por la bonfarto de la socio, ne por financi militojn; infanoj troviĝu en lernejoj, ne en armeoj kiel rekrutoj; naciaj buĝetoj fokusiĝu je konstruo de homa kapablo, ne je konstruo de mortigaj armiloj.” Sinjoro Ban finis sian mesaĝon per alvoko: “Okaze de la Internacia Tago de Paco, mi alvokas al ĉiuj batalantoj tra la mondo trovi pacajn solvojn al siaj konfliktoj. Ni laboru kune por atingi sekuran, justan kaj prosperan estontecon por ĉiuj homoj.”

Oficejo de Universala Esperanto-Asocio ĉe Unuiĝintaj Nacioj:
777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.
212-687-7041
www.esperantoporun.org

Office of the Universal Esperanto Association at the United Nations
777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.
212-687-7041